

Eŭropa Bulteno

Februaro 2012, Numero 113

NIAJ LANDAJ MOVADOJ ESPERANTO EN SVEDIO

La sveda esperanto movado havas tre brilan historion. Unu el la plej unuaj Esperanto-kluboĵoj en la mondo troviĝis en Upsala. Tre frue internacia gazeto estis redaktita en la sama sveda urbo kaj presita en Jalto.



Dum la unua duono de la 20-a jarcento Esperanto rapide kreskis, samkiel en plural landoj. La Sveda Esperanto-Federacio estis fondita en 1906. Krom la federacio kun siaj multaj lokaj membrokluboĵoj oni fondis ankaŭ plurajn aliajn organizojn, laŭ la tiutempaj bezonoj. Plej gravis ŝajne la kooperativa eldonejo kaj la Sveda Esperanto-Instituto. Internaciaj organizoj ankaŭ fortis en Svedio, ekzemple Sennacia Asocio Tutmonda, kiu havis multajn membrojn, kaj aktivis ankaŭ landa laborista organizo SLEA.

Aliaj internaciaj organizoj kreis landajn sekciojn, ekzemple ILEI, la esperanta instruista organizo, kaj KELI, la kristanoj, kaj IFEF la fervojistoj. Ĉiuj tiuj organizoj ankoraŭ ekzistas krom la fervojista.

La pinton atingis la sveda Esperanto-movado dum la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj.

Ingemund Bengtsson estis plurfoje socialdemokrata ministro kaj poste prezidanto de la sveda parlamento. Li pli frue estis laboristo en biciklofabriko kaj unu el multegaj laboristoj kiuj dum

la 30-aj jaroj esperantistiĝis. Ilia kialo estis simpla kaj klara: homoj kun nur ses- aŭ sepjara baza edukado bezonis Esperanton por povi komuniki internacie.

Ingemund Bengtsson iam klarigis al mi kial Esperanto en Svedio komencis malkreski meze de la pasinta jarcento. Tiam la laborista movado, ne nur la registaro kaj parlamento, sed ankaŭ la popola kleriga organizo kaj la sindikatoj, decidis ke la tuta popolo devus havi eblecon lerni internacie uzeblan lingvon, do ne nur la alte edukitaj mez- kaj superklasuloj. Ni esperantistoj povas nur bedaŭri, ke oni tiam elektis la anglan. Ĝi nun estas la ĉefa fremda lingvo. Antaŭ la dua mondmilito la germana plej gravis en Svedio.

Ekzistas ja opinio, ke la rapida kresko de la angla lingvo en la mondo estas lingva imperiismo, brita aŭ usona. Sed Svedio fakte mem elektis la anglan.

Ankaŭ Ingemund Bengtsson eklernis la anglan en vesperaj studcirkloj kaj samtempe forlasis Esperanton. Li tamen, multajn jarojn poste, revenis al Esperanto. (Mia patro ankaŭ esperantistiĝis dum la 30aj jaroj. Li poste, en la 60-aj jaroj, treege strebis lerni la anglan en vesperaj studcirkloj, sed li neniam sukcesis elparoli kompreneblan anglan. Li restis esperantisto, malriĉa paperfabrika laboristo, kun korespondamikoj tutmonde.)



Mi esperantistiĝis en 1994 kaj estis elektita vicprezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio la sekvan jaron. Proksimume tri jarojn mi bezonis por kompreni la movadan strukturon kaj problemojn. De tiam mi konstatas ke la "duoniĝtempo" de la movado estas dek jaroj.

Kelkaj problemoj por Esperanto estas internaj movadaj, aliaj dependas de la evoluo de la socio, laŭ mia kompreno.

Plej gravas por la movado eble ke ni estas tro malfortaj por modernigi la organizan strukturon,

tiel ke restas tro da diversaj organizoj. Ne estas sufiĉe da aktivuloj por trovi taŭgajn komitatanojn, estraranojn kaj revizorojn por ĉiuj organizoj, kion oni taksis necesa antaŭ jardekoj. Ekzemple la Esperanto-Instituto, kies statuto enhavas plurajn taskojn el kiuj preskaŭ nenio plu aktualas. Ŝajne la nacia ekzameno iam estis grava afero, sed neniu plu memoras kiam laste okazis tia ekzameno. Ŝajne en la 80-aj jaroj.

La eldonejo tre rare eldonas librojn. "Svedajn" librojn oni eldonas en Usono, Brazilo kaj Slovakio. La kooperativon finance savas Ido de bankroto. La sveda Ido-societo malaperis antaŭ longe kaj ĝi postlasis grandan fonduson ĉe komerca banko. Makulaturato povas esti "transdonita" al universitatoj kaj lernejoj internaciaj, kiuj nenion pagas, sed pagas la Ido-fonduso. Noveldonitaj libroj por vendado aperas malofte.

La fakto ke tro multas Esperanto-organizoj ne nepre signifas ke ili interbatalas. Sed klaras al ĉiu sveda esperantisto ke ili inter si ne povas bone kunlabori.

La sveda socio ne konas bezonon por la lingvo internacia, ĉar jam tiun rolon transprenis la angla. Laŭleĝe kaj dekrete la angla ne apartenas al modernaj fremdaj lingvoj en la sveda lernejsistemo. Ĝi estas nia dua propra lingvo. Kaj sendube veras, ke la plej multaj svedoj mezjaraĝaj kaj pli junaj havas internacian helplingvon, kiu sufiĉe bone taŭgas por ekzemple turismi eksterlande.

Nia ĉefa problemo kiel esperantistoj estas, ke ni proponas bonan solvon al la lingvoproblemo. Sed ni proponas solvon al nekonata problemo. Al preskaŭ neniu svedo evidentas ke alia internacia lingvo ol la angla estas bezonata. Kiu homo ĝenerale akceptas solvon kiam li aŭ ŝi ne koncias pri la problemo?

Finfine mi ĝojas rakonti ankaŭ pri pozitivaj aferoj. La svedaj lernejoj konas diversajn kategoriojn da lingvoj: la svedan, la anglan, la modernajn fremdajn lingvojn (al kiuj ne apartenas la angla) kaj la gepatrajn (pli precize tradukite la patrinajn), al kiuj apartenas la araba kaj la turka kaj centoj da aliaj enmigrint-lingvoj, sed ne la sveda, angla aŭ modernaj fremdlingvoj. Kaj ĵus venis iu tute nova kategorio: la homa lingvo. Ĝi estu libere elektebla. Kaj jam komencis junaj, brilaj, entuziasmaj esperantistoj la prelaboron por prezenti Esperanton kiel homa lingvo!

Alia bona afero estas ke venas al Esperanto junaj studentoj. Ili ne bezonas "duan lingvon", multaj jam konas plurajn, sed iel ili renkontis Esperanton kaj trovis ĝin interesa. La Stokholma Esperanto-klubo ekzemple longe serĉis junajn gvidantojn, kaj nun trovis! Sed kiom da junaj esperantistoj venas? Ni ne scias, ĉar kelkaj ne volas membriĝi al la organizoj kaj pagi kotizon. Aliaj junaj membroj jam forlasis la Federacion pro konflikto kun la "maljunuloj".

Estus kompreneble interese scii kiom da novaj esperantistoj venas, membroj aŭ nemembroj, kompare kun la maljunaj amikoj kiuj forlasis nin, sed tio dume ne eblas.

La Sveda Esperanto-Federacio (SEF) antaŭ unu jaro havis proksimume 400 membrojn kaj probable daŭre malkreskis en 2011. Estas ankoraŭ deko da aktivaj kluboj, sed piuraj ne plu regule kunvenas dum la jaro. Plej multaj membroj estas pensiuloj.

Lastaŭtune SEF invitis ĉiujn esperantistojn en Svedio, sendepende de mebreco en ajna organizo, al kunveno por diskuti la krizan situacion. La rezulto estis magra. Eble la plej grava rezulto estis ke granda parto de la junuloj forlasis la patrinan organizon. La rekte videbla kialo estis lingva kverelo. Ĉeestis kelkaj komencantoj kaj ankaŭ kelkaj svedlingvanoj kiuj multege laboras por la Esperanto-movado sed ankoraŭ ne bone regas la lingvon. Kaj ĉar ĉiuj ĉeestantoj estis svedlingvanoj, la kunveno komence decidis ĉi-foje uzi la svedan.

Iom malfruis la junuloj, ne sciante la decion pri elekto de laborlingvo kaj komencis esperante paroli. Post kverelo pri tio pluraj junaj esperantistoj forlasis la kunvenon kaj poste ankaŭ malmembriĝis el la Federacio. Kredeble tiu malmembriĝo havis ankaŭ aliajn kialojn ol la malsamopinio pri laborlingvo. Malfacilas diri kiom da junaj esperantistoj estas, sed novaj daŭre venas.

Krom la neŭtrala Federacio kun membrokluboj restas ankoraŭ en Svedio unu laborista klubo en Stokholmo, ne tre granda. Ĝi kaj kelkaj unuopaj membroj dise en la lando formas laboristan landan organizon, SLEA.

Tre rare okazas ke unopaj esperantistoj memstare eldonas libron sen kunlaboro kun la supre menciita eldoneja kooperativo.

Ekde jam 15 jaroj funkcias kooperativo Esperanto-Garden aŭ Esperanto-Gastigejo. Multaj



aranĝoj okazas tie, ekzemple ĉiujare somera Esperanto-kurso. Plurfoje SEF tie havis sian landan kongreson. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj la Sveda Esperanto-instituto regule aranĝis simpoziojn kun famaj internaciaj prelegantoj. La junulara movado ankaŭ aranĝis tie Kulturan Esperanto-Festivalon kaj IJK. Lastsomere feris en Esperanto-Gastigejo ankaŭ Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF). Venontsomere okazos en E-G KER-ekzameno samtempe kun diversaj lokoj tutmonde.

Multaj svedaj esperantistoj tre aktivis interrete. Ne eblas ne mencii la tro frue forpasintan Franko Luin, veran pioniron kiu kreis la hejmpaĝaron de SEF kun la internacie fama Kiosko, per kiu legeblis la plej granda gazataro de la mondo.

Kelkaj legantoj certe pensas ke mi estas pesimisma. Mi ne same pensas, mi kredas ke mi estas realisma. Kaj mi scias ke mi tamen estas honesta. Kial mi do donas tiel problemlenan bildon de la situacio de Esperanto en Svedio? Estas du kialoj. Unue, kvankam mi ne bone konas la situacion en aliaj eŭropaj landoj, mi kredas ke similaj problemoj ekzistas ankaŭ ĉe kelkaj niaj eŭropaj najbaroj. Due, mi certas ke multaj homoj ne emas ŝanĝi ion se li ne konscias pri la problemo. Kaj ŝanĝi aferojn ni devos!

Ni devas demandi nin, ĉu niaj strukturoj kongruas kun la nuntempaj vivmanjero kaj teknika nivelo de komunikado. Kaj antaŭ ol oferti brilan solvon, ni devos defini la problemon solvendan. Tiu lasta certe varias de lando al lando, ni ja do devos repensi, kaj loke kaj internacie. Se ni ne povos tion fari, mi estas pesemisma pri la estonto.

Bengt Nordlöf

NOVAĴOJ PRI EŬROPA KONFERENCO EN TRIESTO »KIA ESTUS LA NUNA EŬROPO SEN EU?«



En la januara numero ni informis la legantojn detale pri la konferenco, kies specifajoj estas ke esperantistoj organizas gravan konferencon en kiu la ĉefa temo ne rilatas al

lingvoj kaj Esperanto mem. La plej nova evoluo estas tre pozitiva. Triesta Esperantista Asocio sukcesis atingi ke la regiona registaro de Friulio, Venetio, Giulio aprobis kunhelpi finance transprenate gravajn kostojn je valoro de pli ol 10.000 eŭroj. Tio ebligis interalie ke la studentoj de ĵurnalismo kiuj partoprenos havos senpagajn tranoktojn kun matenmanĝoj kaj la tagmanĝon la 10-an de majo. Intertempe, krom la grupoj el universitatoj de Zagrebo, Zadar, Ljubljana, Koper kaj Triesto anoncis sian partoprenon ankaŭ grupoj el Graz (Aŭstrio) kaj Bratislavo (Slovakio). Eksa ŝtatprezidanto de Slovenio, Milan Kučan, konfirmis sian partoprenon kaj tio estas verŝajne la unua konferenco kiun organizas Esperanto-asocio en kiu partoprenas eĉ du eksaj ŝtatprezidantoj kaj pluraj aliaj elstaraj personecoj de politiko kaj scienco. Ni kore invitas ĉiujn interesitajn gejunulojn aliĝi al la konferenco. Por certa kvanto da aliĝintoj el EU landoj kaj Kroatio ni povos certigi senpagan loĝadon.

Interesitaj esperantistoj kiuj planas partopreni en paralele okazanta Alp-Adia renkontiĝo anoncu vian venon laŭeble urĝe por ke ni povu rezervi hotelĉambrojn.



Skribu al: europaesperantounio@gmail.com (neitaloj) aŭ al noredv@teletu.it (italoj).

La projekto estas financata de EU programo »Eŭropo por civitanoj«.

Zlatko Tišljar

16-a KONFERENCO DE ALP-ADRIAJ ESPERANTISTOJ TEMO: ALP-ADRIA LABORKOMUNUMO, PLUA EŬROPA ENGAĜIĜO



De la 9-a ĝis la 12-a de majo 2012, en Triesto-Italio, renkontiĝos por la 16^a Konferenco la esperantistoj de Esperanta Rondo de ALP-ADRIO, por debati la temon *Alp-Adria Laborkomunumo, plua eŭropa engaĝiĝo*, post la partopreno en la laboroj de la Internacia Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio, okazanta samloke de la 9^a ĝis la 11^a de majo.

La tradicio de tiuj ĉi konferencoj datas de la jaro 1989, kelkajn jarojn post la starigo de politika projekto, nomita Laborkomunumo de

la Regiono de Alp-Adrio, kiu naskiĝis en formo de vasta teritorio reprezentanta utilan instrumenton por agado kaj kontaktoj inter la registaroj de tiu ĉi parto de Eŭropo kaj ponton inter oriento kaj okcidento. La celo estis forigi ideologiajn barojn, kaj estis rekonita en la regionoj kiel la plej taŭga “ejo” por efika kunlaborado. La Laborkomunumo startis kun membriĝo de 9 regionoj, kiuj baldaŭ fariĝis 19, nome: *Friuli Venezia Giulia, Veneto, Trentino-Alto Adige, Lombardia, Emilia Romagna* en Italio, *Karintio, Supra Aŭstrio, Stirio, Salzburgerland, Burgenland* en Aŭstrio, *Canton Ticino* en Svislando, *Gyor-Mason-Sopron, Vas, Baranya, Zala, Somogy* en Hungario, *Bavario* en Germanio, plus *Kroatio kaj Slovenio*. Estas evidente ke la interkompreniĝa problemo de la Laborkomunumo ne estas simpla... ĉiuj lingvoj de tiuj regionoj estas egalrajtaj kaj uzataj, pli-malpli efike sed certe kun konsiderinda kvanto da elspezo.

Kaj ĝuste tiu lingva diverseco favoris la agadon de esperantistoj, kiuj jam ekde 1955 organizis jaran kunvenon, ĉiujare en alia lando. Post la starigo de la politika Laborkomunumo kaj okazigo de debatoj kaj interkonsentoj, la Esperanto-grupoj fondis similan organizon nomitan “Esperanta Rondo de ALP-ADRIO” kun tiaj celoj.

Verdire la nuntempa Laborkomunumo de ALP-ADRIO estis iom flankenmetita pro kreado de similaj organizoj laborantaj sur pli vasta teritorio, sed tio ne forprenas ĝian validecon kaj enan gravegan valoron.

Tiu ĉi Konferenco, organizata de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, okazas post kelkjara haltado, kun la intenco renovigi la eŭropan engaĝigon kaj la kunlaboron inter la Esperanto-grupoj de tiu ĉi teritorio kiu situas inter ebenaĵoj diversaj, Alpoj kaj Adriatika Maro. Dum tiu ĉi 16-a aranĝo oni pritraktos kaj daŭrigos la temojn proponitajn de Eŭropa Esperanto-Unio, sed precipe oni klopodos intensigi la rilatojn inter la esperantistoj kaj proponi agadplanon por plivalorigi la komunajn tradiciojn, la kulturajn interŝanĝojn kaj utiligon de la internacia lingvo Esperanto en neesperantistaj medioj.

Informoj ĉe: nored@tiscali.it

Edvige Ackerman

RIĈA KULTURA PROGRAMO DUM LA EEU-KONGRESO EN GALIVO



En la kongreso estas aparta atento dediĉita al kultura programo. Ĉiuvespere estos iu grava aranĝo. Aparte alloga estos teatra programo. Ni povos spekti la jam relative konatan, sed tamen tre vidindan spektaklon de Ŝelter-scenejo el Serbio »10 tagoj de kapitano Postnikov«, la soldramon de Georgo Handzlik »Zamenhof« kaj tute novan programon kiun kune pretigis Georgo

Handzlik kaj Saša Pilipović »Kabaredo«. Ili ludis premiere la ludon januare an Brazila kongreso kaj pri tio aperis pluraj artikoloj, interalie tutpaĝa en pola gazeto el kiu ni prenis la uzitan foton. Krome ni havos muzikkonzertojn de Jomo kaj Georgo Handzlik kaj Nacian vesperton kun irlanda muzikprogramo. Tiuj do, kiuj ŝatas kulturon trovos multon por si. Aparte necesas subteni nian teatran arton, pri kiu nuntempe okupiĝas nur tre malmultaj profesiaj artistoj.

Maja Tišljar

LA JARO DE TIBOR SEKELJ A) OMAĜO EN MARIBOR

En Maribor (Slovenio) ni preparis nin bone por starti per serio da eventoj en la jaro 2012 - 100-jariĝo de la naskiĝo de Tibor Sekelj. Ni decidis komenci la aktivadojn en la tago de lia naskiĝo - la 14-an de februaro kaj organizis rondan tablon pri tiu grava esperantisto sed ankaŭ sufiĉe konata persono en ĉiuj eksjugoslaviaj landoj, aparte kiel verkisto kaj esploristo de nekonataj partoj de la terглоbo.



Ni planis kiel prelegantojn de la ronda tablo la edzinon de Tibor Sekelj, Erzebet Sekelj, verkistinon Spomenka Ŝtimec, kaj du Mariboranojn: Zdenka Rojc kiu dum preskaŭ unu jaro estis sekreatriino de Tibor en Subotica kaj min, kiu intense kunlaboris kun li proksimume de 1966 ĝis lia vivofino. La ronda tablo okazis en solena ejo de la malnova urbodomo. Bedaŭrinde Erzebet ne povis alveni.

Partoprenis trideko da personoj, ĉefe Mariboraj esperantistoj. Post ampleksa prezento de la vivo de Sekelj kaj aparte de lia verkista aktivado kaj legataj eltiraĵoj el liaj verkoj en la slovena traduko (en la slovena aperis entute 5 liaj libroj) estis ankaŭ regaleto per



manĝoj kaj trinkaĵoj. La aranĝo elvokis tre bonan reagon de la publikaj informrimedoj. Aperis ampleksa artikolo pri Tibor Sekelj kaj la aranĝo en la ĉefa tagĵurnalo de norda Slovenio Večer kaj loka televido Televizija Maribor elsendis 45-minutan elsendon "V žarišču" (En fokuso) dediĉitan al Tibor kaj Esperanto en kiu vive partoprenis Zlatko Tišljar kaj Mario Vetrih (telefone ankaŭ Zdenka Rojc). La elsendo estis poste du-

foje ripetita, do la poresperanta reklamo estis tre ampleksa en la regiono de Norda Slovenio.

Esperanto-societo de Maribor planas organizi ankoraŭ unu prelegon pri Tibor, fintraduki la vikipedian artikolon pri Tibor al la slovena kaj aperigi ĝin en ampleksa formo kaj reeldoni la romaneton "Kumeŭaŭa - la filo de ĝangalo" en la slovena kaj publike prezenti ĝin okaze de Eŭropa lingva tago en septembro. Mariboraj esperantistoj ankaŭ ellaboris projekton por Grundvig kiu antaŭvidas studadon de la verko de Tibor Sekelj far partoprenantaj personoj organizitaj en 6 eŭropaj landoj. Se la projekto estos aprobita en dua duono de la jaro ni aldonos al niaj agadoj ankaŭ la erojn de tiu projekto.

Zlatko Tišljar

B) OMAĜO EN BERLINO



Ankaŭ en Berlino oni ŝatas la rakontojn de Tibor Sekelj specife pri liaj eksterordinaraj esplorvojaĝoj kaj havas konscion pri lia eminenteco. Nur 3 jarojn antaŭe en kulturcentro danziger50 (nomita lau stratnomo kaj numero) estis voĉlegita dum vesperaranĝo vojaĝrakontoj de li.

Volonte la Esperanto-grupo en tiu ĉi kulturcentro sekvis alvokon de EEU omaĝi la eminentan

esperantiston okaze de lia 100-a naskiĝdatreveno kaj invitis al Tibor-Sekelj-omaĝo la 27-an de februaro 2012.

Dank al la riĉa materialo detale prezentanta la biografiajn faktojn, personecon kaj verkon de Tibor Sekelj en interretaj paĝoj kaj en revuoj unuavice materialo prezentita de Zlatko Tišljar, Spomenka Ŝtimec kaj Arno Lagrange (ekz. Wikipedia artikolo

http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj) mi prelegis superrigarde pri la jubileulo. La vizitantoj povis sperti Tibor mem pro montrado de intervjuoj kun li en interreto (ekz .

www.youtube.com/watch?v=AvnDVRXR4o). Parte ni rigardis la brilan prelegon de Spomenka Ŝtimec en la majstra filma realigado de Francisco L. Vauthey

(<http://vimeo.com/36402930>). Auskultintoj notis la retadreson por hejme ĝui ĝin entute.


Prezentitaj estis multaj el liaj verkoj por montri la multflankecon de Tibor. El kelkaj verkoj estis voĉlegitaj ekzemploj por lia etnologia esplorkoncepto, por lia respondecplena agado rilate al homoj en diversaj kulturoj kaj por lia literatura verkado.

La vizitantoj uzis la eblecon aĉeti librojn de Tibor Sekelj. Lu Wunsch-Rolshoven de la Asocio Esperanto-Land prizorgis librostandon. Aĉetitaj estis ekzemple la libroj, „Mondo de travivaĵoj“, „Elpafu la sagon“ kaj „Kumeŭaŭa – filo de la ĝangalo“.

Ne mankis personaj rememoroj pri Tibor Sekelj. D-ro Detlev Blanke rememoris pri renkontiĝoj kun li dum diversaj internaciaj aranĝoj kaj pri prelego de Tibor en Berlino en 1978 en la siatempa "Club der Kulturschaffenden" (Klubo de Kulturagantoj – hodiaŭ reprezentejo de federacia lando Hamburgo en Berlino).

Detlev Blanke konfesis, ke li siatempe ne konsciis pri la graveco de Tibor. Li priskribas lin kiel „tre malgranda, fragile svelta homo” kaj konstatis, ke “oni ne povis imagi kiom da kuraĝo kaj kiom da forto havas tiu hometo, tiu vireto“. Li rememoris: “estis tute plena la salono, kaj li rakontis pri liaj diversaj vojaĝoj... Li prezentis diapozitivojn plejparte nigreblankajn, ĉar temis pri malnovaj vojaĝoj. Ni kompreneble mire gapis kaj vidis, kion li montris kaj poste ni manĝis kune kun kelkaj homoj el GDREA en la restoracio de tiu klubo. Estis tre agrabla kunesto; kaj Tibor estis tre agrabla diskutanto.”

Alia rememoro de Detlev Blanke koncernis eldonplanon nerealigita: “Fine de la 70-aj jaroj ekzistis projekto publikigi elekton de rakontoj en germana lingvo en Brockhaus-Verlag kaj mi devis verki iun ekspertizon pri tio. Mi orientiĝis laŭ la diversaj materialoj kaj kompreneble mi faris pozitivan ekspertizon. Bedaŭrinde ne aperis tiu kolekto. Mi ne scias kial. Pro tio mi kun ĝojo aŭdas, ke aperis en Svisio verko en germana lingvo.“ Temas pri la libro „Durch die Wälder Brasiliens zu wilden Indianerstämmen“ (Orell Füssli Verlag, Zürich 1959) ankaŭ prezentita dum la aranĝo.



Detlev Blanke rakontis pri kelkaj ideoj kaj entreprenoj de Tibor Sekelj, ekzemple pri liaj imagoj rilate al Esperanto en Afriko, pri prelego de Tibor dum socilingvistika konferenco en Tokio en 1986, pri rilatoj inter Tibor Sekelj kaj Ivo Lapenna, kies „interbatalon“ li povis observi. „Estis iomete stranga, ĉar ambaŭ estis unuaklasaj homoj.“, Blanke rimarkis kaj aldonis: „Ivo Lapenna pli favoris la tielnomatan surprismon ... kaj Tibor estis pli ligita al la bazo verŝajne pro liaj diversaj spertoj.“

Eĉ la voĉon de Tibor Sekelj Detlev Blanke aŭdigis por ni. Sonbendon el 1972 li kunportis. Ni aŭdis unue William Auld, kiu anoncis premiiton en Belartaj Konkursoj dum la 57-a UK en Portland (USN), poste Tibor ricevinte unuan Premion komencis legi sian rakonton “Kolektanto de ĉielarkoj”. Ni aŭskultis emociigite kaj ricevis impreson de lia parolmaniero.

Alian faceton de la agado de Tibor Sekelj Detlev Blanke videbligis parolinte pri la muzeologia fakvortaro, kies esperantan parton redaktis Tibor Sekelj kaj Bernard Golden. Tiu impona libro kaj ekzempleroj de Geografia Revuo redaktita de Tibor Sekelj cirkulis inter la vizitantoj.

Detlev Blanke bedaŭris, ke nur aperis unu kajero dum la jaro, do 6 entute, ĉar ne sufiĉis nombro da abonantoj – ĝenerala problemo rilate al eldonado.

Parto de la aranĝo estis dediĉita al informoj pri aktualeco de la ideoj de Tibor Sekelj. Intereson vekis la mencio, ke dum la filmfestivalo en Berlino estis montrita la filmo Xingu pri fama indiana teritorio en Brazilo kaj pri la malkovroj kaj penoj de esploristoj gardi la indianojn kaj ĝiajn kulturon kaj landon. Temas pri teritorio al kies fruaj esploroj apartenis Tibor Sekelj. Tiu ĉi brazila filmo antaŭ la „Umweltgipfel Rio+20“ estos montrata en la kinejoj de Brazilo. La Guapore-projekto estas alia ekzemplo. Temas pri projekto de la Etnologiaj Muzeoj en Berlino, Vieno, Basel kaj Leiden, kiun priskribas d-ro Andreas Schlothauer en Kunst&Kontext eldono 01 2011 akcentante la signifon de la etnologiaj objektoj, el kiuj nur malmultaj estas ekspoziciataj, por la indiĝenaj popoloj, iliaj kulturoj kaj

memkonscio. Li mencias verkon de Sekelj, kiu eslorekspediciis ankaŭ tra kelkaj regionoj en Sudameriko kaj objektojn, kiujn li kolektis.

Ankaŭ ekspozicion de la Etnografia Muzeo en Zagreb (Kroatio) el la lastaj jaroj montrinta etnologiajn objektojn de Sekelj kaj emfazinta lian gravan agadon ni priparolis.

Dankon ni shuldas al la Muzeo de la urbo Senta (Serbio), kies kuratoro Atila Pejin je nia peto sendis kelkajn fotojn de etnologiaj objektoj de Sekelj pri kiuj disponas la muzeo. Ili pliriĉigis nian aranĝon.

Memkompreneble ni atentis la omaĝojn pri Tibor Sekelj en aliaj partoj de la mondo - en Senta, kie lia vidvino Erszebeth Sekelj kontribuis, en Mendoza ktp. La impresa raporto de Anneleen Nys instruante Esperanton dum vojaĝo sur spuroj de Tibor estis admirata.



Rimarkindan skriban kontribuon ni ricevis de Will Firth, tradukisto, kiu jam en 1997 pretigis anglalingvan tradukon de la infanlibro „Kumeuaua – filo de la ĝangalo“, sed bedaŭrinde ĝis nun ne sukcesis trovi konvenan eldonejon. Laŭ li pli malfaciligas tion la postulo de la vidvino pri granda eldonkvanto. “Depost 2006 mi nenion plu entreprenis.”, skribis Will Firth. Ni diskutis pri la problemo kaj opinias, ke nun, kiam estas la alvoko traduki kaj eldoni tiun libron en multaj lingvoj denove eble per helpo de EEU oni solvu la

problemon en la Tibor-Sekelj-jaro.

Enkondukis nian omaĝan aranĝon la poemo de Poul Thorsen aludanta humure kelkajn eventojn el la biografio de Sekelj.

Finis ĝin la tre serioza salutvorto de Zlatko Tishljar, sekretario de EEU, al nia omaĝa aranĝo trafe karakterizanta la personecon de Tibor Sekelj kaj eldiranta konkludojn el la modela agado de la jubileulo. Zlatko Tiŝljar eksplikis:

“Mi volas nur memori pri la aktualeco de la filozofio de Sekelj kiu en kelkaj libroj eksplikas tion kion li efektive serĉis: ne la montojn, riverojn aŭ urbojn - li serĉis la homan animon, la homan esencon. Kaj li klarigas ĝin tiel:

Homo kiel unuopulo estas la plej bona en la mondo. Ĉiu en sia ĉirkaŭaĵo. Do oni ne komparu sin kaj konkuru, oni simple estu tio kio oni estas kaj konsciu pri sia propra escepteco. Homo kiel socia estaĵo konsciu ke nenio el la materiaĵoj povas aparteni al individuo, sed ĉio estas nia, ĉar en produkto de ĉio partoprenis tre multaj kaj ĉar la naturon posedas ĉiuj kiuj ĝin bezonas.

Tia filozofio estas tre aktuala en la nuna novliberalisma tempo kiam la plej grava afero estas havi kaj ne esti, kiam oni batalas kaj komparas sin, kiam oni alproprigas naturaĵojn, eĉ parcelojn sur la Luno... Oni devus remalkovri Tibor Sekelj.”

Fritz Wollenbe

C) MANIFESTAĴO EN SUBOTICA

Laŭ la interkonseno inter Esperato-Societo „Tibor Sekelj“ kaj la urbestro de Subotica, sinjoro Saša Vuĉinić, en majo 2012 Subotica digne rememoros sian elstaran loĝinton,

honoran civitanon, verkiston, mondvojaĝanton, kiel, modeste, staras sur lia tomboŝtono – Tibor Sekelj.

La urbo en kiu li travivis la lastajn jarojn de sia vivo, preskaŭ ĝian kvaronon, la urbo kiu – jaron antaŭ lia forpaso – distingis lin per premio por viv-verko, en majo 2012 markos la centjaran datrevenon de lia naskiĝo.

Unua kunsido de la Organiza Komitato kiu zorgos pri la programoj okazis la 1-an de februaro, kaj tiel komenciĝis la periodo de streĉa laboro por ke la maja programo fluu glate.

La kerno de la manifestaĵo estos **Ronda tablo Vivo kaj verko de Tibor Sekelj**, kun proksimume 25 ĝis 30 invititaj partoprenantoj, kies referaĵoj, eseoj, estos prezentitaj en kelkaj sekcioj. Dudeko da personoj el deko da landoj jam estas persone invititaj (pluraj jam konfirmis sian partoprenon), sed la listo de partoprenantoj ne estas ankoraŭ fermita: ni petas ĉiujn kiuj povas valore kontribui al la temo(j) de la *Ronda tablo*, tiujn pri kiuj ni ne havas informojn, ne hezitu, sed tuj kontaktu la organizantojn.



Antaŭvidite estas ke, pere de interreto, la tuta programo estu videbla dise tra la mondo. Eĉ plie: ĉiu kiu volos, povos, pere de skajpo, partopreni la diskuton... En du lingvoj, ĉar la tuta sesio iros en du (aŭ ni diru tri?) lingvoj: serba kaj/aŭ kroata, kaj Esperanto, kun simultana traduko. Necesajn teknikajn detalojn ni publikigos ĝustatempe. La plenajn tekstojn de referaĵoj kaj la diskuton ni planas eldoni libroforme.

Ĉirkaŭ la Ronda Tablo okazos aro da aliaj programoj, en kies preparoj partoprenos pluraj urbaj institucioj. La kompleta programo de la manifestaĵo ne estas ankoraŭ fiksita, ĉar la ideoj kaj interparoloj ankoraŭ pulsas.

Jen la kontakt-adresoj de OK: djor-esp@yunord.net; editor@diurnarius.info; skajpo: georgius.dragojlovic; ipernity: www.ipernity.com/home/205558; twitter: @suwineknigt

Đorđe Dragojlović

D) REMEMOROJ PRI TIBOR SEKELJ – ARANĜO EN HUNGARIO



Okaze de la 100-jariĝo de la naskiĝo de *Tibor Sekelj*, same kiel en aliaj partoj de Eŭropo, ankaŭ hungaraj esperantistoj rememoras lian eksterordinaran vivon kaj lian senlacan Esperantan agadon. Je la invito de la Hungaria Esperanto Asocio (HEA) la 22-an de februaro la vidvino de Tibor Sekelj, *Erzsébet Székely* prelegis en Budapeŝto pri la fama esperantisto. Ŝi rakontis historietojn, kiuj pruvas, ke la forta interesiĝo pri la mondo en la frua infanaĝo aperis ĉe Tibor Sekelj. La prelego, nature, prezentis la tutan vivon kaj la vastan agadon de li. (Pri tiu vivo kaj agado la leganto povas informiĝi sur la interreto, ekzemple:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj).

Konversacio post la prelego, foto: János Nagy

Post la prelego sekvis koversacio ĝis la forvetura tempo de Erzsébet Székely.



Okazis ankaŭ skriba rememoro pri Tibor Sekelj, nome en la februara numero de la hungarlingva informilo *Nyelvi hírek a világból* (Lingvaj novaĵoj el la mondo). Krom tiu rememoro sub la titolo *2012 – 125 éves az eszperantó* (125 jara estas Esperanto) la informilo enhavas artikolon ankaŭ pri tio, kiel fariĝis viva lingvo el la lingvoplano Lingvo Internacia. La artikolo skize prezentas la historion de Esperanto

en la unua du jardekoj. Pliaj (mallongaj) informoj estas en la kajero pri la 35-a Hungaria Esperanto-Kongreso, la 9-a Ĉina Esperanto-Kongreso kaj la Junulara E-Semajno (JES) en Gdansko.

(La menciita informilo estas pretigita ekde dek unu jaroj, ĉiujare 3-5-foje, en individua zorgado por informi ne esperantistojn. Ĝin sufiĉe sisteme ricevas kvazaŭ 40-50 personoj okaze de kunvenoj de civilaj rondoj kaj organizaĵoj. Inter ili estas, ekzemple, tablosocieto de lingvistoj. La zorge elektitaj kaj sisteme liveritaj informoj formas el indiferentaj homoj simpatiantojn kaj amikojn de Esperanto.)

László Gados

ESPERANTO PREZENTITA AL HERMAN VAN ROMPUY



La 5-an de februaro 2012 en Antverpeno okazis la eŭropa “Erensenaat” (Honora Senato), kaj Flory Jitdoeck, vicprezidantino de EEU sukcesis tre bele kanti la eŭropan himnon en Esperanto en la ĉeesto de Herman Van Rompuy, prezidanto de la Konsilio de Ministroj de EU! Poste ŝi prezentis min al li, kaj mi gratulis lin pro la eminenta parolado, kaj sukcesis fari tion nederlandlingve. Kaj Flory diris al li, ke la vortoj de nia himno en Esperanto perfekte esprimas tion, kion li diris en sia parolado! Do, ege sukcesa tago!

La prezidanto de la konferenco plurfoje anoncis ke Flory kantos la eŭropan himnon en Esperanto!

Seán Ó Riain

TRADUKFORUMO EN BRUSELO la 27-an de februaro 2012: "Lingvoj kun mondaj ambicioj - Esperanto kaj la ĉina"

Esperanton povis brile prezenti en Traduk-Forumo de la Eŭropa Komisiono en Bruselo Marek Blahuš el la Ĉeĥa Respubliko, nuntempe laboranta en SCIC (la organizaĵo de buŝtradukistoj por ĉiuj EU-institucioj). Marek skizis la historion kaj devenon de Esperanto de ĝiaj komencoj en cara Pollando en 1887 ĝis la nuna tutmonda disvastiĝo kaj akcepto kiel unu el la lingvoj de 'Google-Translate' en februaro 2012.



La parolanto skizis Zamenhof-klopodojn por solvi la problemon de reciproka kompreno en sia denaska Bjalistoko en orienta Pollando en la malfrua 19a jarcento, kie judoj, poloj, rusoj, germanoj kaj aliaj vivis en reciproka suspektemo kaj nekomprene. Li klare kaj vigle prezentis la komencajn sistemojn konceptitan

de Zamenhof kaj emfazis ke Esperanto estis jam lingvo de originala poezio ekde la Unua Libro en 1887. Pro ĝia efikega regula sistemo Esperanto povas esprimi per unu radikojn bazitajn sur kunmetitaj vortoj, kie la angla aŭ franca bezonus 8-10 malsamajn radikojn: ekzemple, la radikoj 'manĝ' povas kombiniĝi kun 40 afiksoj por esprimi ideojn kie la angla bezonas apartajn radikojn "eat, edible, dining-room, meal, food, cutlery, snack, feast". Li ankaŭ atentigis pri la ligoj inter Esperanto kaj la ĉina, rilate la nevarieblecon de morfemoj, kio ne estas karakteriza en iu ajn hindeŭropa lingvo.

Marek skizis la persekutadon de esperantistoj far Hitler kaj Stalin citante el *Mein Kampf*: "*Tiel longe dum la judoj ne fariĝis mastroj de aliaj popoloj, ili devas paroli iliajn lingvojn, ĉu ili ŝatu aŭ ne, sed tuj kiam ili sukcesos sklavigi aliajn, ĉiuj devos lerni universalan lingvon (Esperanton, ekzemple!), por ke per tiu plia rimedo la judoj povu pli facile regi ilin!*"

Li ankaŭ skizis la ligojn de la Soros-familio al Esperanto kaj montris librojn kiel *Die gefährliche Sprache*, de Ulrich Lins, kaj *La Konciza Enciklopedio de la originala literaturo de Esperanto*, de Geoffrey Sutton. Marek substrekis la intereson montritan de la tutmonda esperanto-parolanta komunumo rilate la defendon de lingva diverseco kaj egalrajteco de la parolantoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, kiel ekz. per www.slovakie.eu. La lasta estas bazita sur la tre populara Esperanto-kurso, senpaga, ĉe www.lernu.net, baldaŭ sekvata de la ekvivalento por la germana. Temas pri la eblecoj lerni per la interreto senpage diversajn lingvojn.

Marek tiam konturis la rezultojn de la Civila Socia Platformo por Multlingvismo, aparte ĝian rekomendon por lingvolernado, kiu estis unuanime akceptita de la Platformo konsistanta el 29 tut-eŭropaj neregistaraj organizoj:

"...alvokas esplori 'propedeŭtikajn' kvalitojn de diversaj lingvoj por uzo en elementaj lernejoj, por eltrovi kiu lingvo estas la plej konvena por kuraĝigi postan lingvo-lernadon kaj ankaŭ kontribui al unu el la EU-prioritatoj de la strategio Eŭropo 2020 "redukti la kvanton da lernantoj kiuj tro frue forlasas la lernejon pro malsukceso al 10% de la nunaj 15%".

La parolanto konkludis per informo pri transdono de libroj en kaj pri Esperanto al la iama prezidanto de la Eŭropa Parlamento, profesoro Jerzy Buzek, kaj pri ties intereso rilate la kantadon de la Eŭropa Himno en Esperanto por plifortigi komunan eŭropan identecon harmonie kun naciaj identecoj kaj certigi daŭran respekton por la principo de la egaleco de ĉiuj 23 oficialaj EU-lingvoj. La prezento finiĝis kun la kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto. Sekvis vigla kaj interesa diskuto, karakterizita de sincera intereso kaj respekto por tiu fascina lingvo, sen spuro pri la kutimaj antaŭjuĝoj kiujn oni kelkfoje aŭdas de malpli erudicia publiko.

Seán Ó Riain

ZAMENHOF – SIMBOLO DE BJALISTOKO

Zamenhof venkis en la voĉdonado por elekti simbolon bjalistokan. La voĉdonadon lanĉis loka ĵurnalo. Estis aro da proponoj kaj oni opiniis ke la plaj fama bjalistokaĵo estas Palaco Branicki. Tamen la rezulto surprizis eĉ la iniciantojn mem: 50% de ĉiuj voĉdonoj iris al Zamenhof. Supozeble nun la urbo iel eluzos tiun fakton en siaj estontaj planoj rilate la urban evoluon kaj diskonigadon.

Jen la pola teksto pri la voĉdono en la pola:

<http://wiadomosci.onet.pl/regionalne/bialystok/wybraliscie-symbol-bialekostoku,1,5033231,region-wiadomosc.html>

Javier Guerrero

RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2011

Ekstera Agado

La dujara laboro kadre de la Platformo por multlingveco en kiu aktivis 29 eŭroponivelaj neregistaraj organizoj rezultis per grava fina dokumento finita komence de aprilo 2011, kiun oficiale publikigis Eŭropa Komisiono en sia retejo julie 2011. Ene de preskaŭ 150-paĝa dokumento en kiu estas rekomendoj de la Platformo al landaj edukaj sistemoj pri tio kiel plibonigi la nekontentigan staton pri lernado de pluraj fremdaj lingvoj troviĝas rekomendo pri neceso studi kaj apliki propedeŭtikajn antaŭlernaĵojn kiuj pliefikigus la lernadon de fremdlingvoj. En la dokumento rekte ne menciigis Esperanto sed ĝi daŭre sendas la leganton al piednotoj kiuj rilatas rekte al eksperimentoj tiurilataj per Esperanto. Ene de la tuta dokumento kun piednotoj Esperanto estas menciata proksimume 70 fojojn kaj tion ni konsideras gravega atingo ene de institucioj de EU. Tiu rezulto estas akirita dank ĉefe al ekstreme granda laboro de nia prezidanto kaj liaj helpantoj dum la du jara-aktivado konvinki ĉiujn 28 aliajn organizojn en la Platformo ene de kvar subgrupoj de la Platformo (krom Seán, laboris en ili Maja Tišljar kaj Jozef Reinart). Dum 2011 Seán Ó Riain kaj Maja Tišljar partoprenis 2 kunsidojn de la platformo kaj investis multegan laboron kadre de la redaktado de la dokumento dum unua kvarono de la jaro. En decembro 2011 Seán partoprenis ankaŭ en madrida konferenco de projekto poliglotti4.eu kiu estas daŭrigo de la Platformo kun tre

reeĥa parolado antaŭ multaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj kaj la reprezentantoj de la unuo pri multlingvismo de la Eŭropa Komisiono.

Ni distribuis en majo leteron al ĉiuj eŭropuniaj parlamentanoj en iliaj propraj naciaj lingvoj, helpe de la subteno de Margareta Handzlik, informante la parlamentanojn pri komuna teksto de eŭropa himno en Esperanto kaj la dokumento de la Primultlingva Platformo.



Alia gravega atingo estis rea ricevo de eŭropa subvencio post 4 jaroj. Ĉi-foje estis aprobita projekto de EEU kadre de subvenciado de organizaĵoj por aktiva civitaneco „Kiel aspektus Eŭropo se Eŭropa Unio ne ekzistus?“, kies centra punkto estas eŭroponivela konferenco tiutema en Triesto okazonta en 2012. Temas pri iom pli ol 45.000 eŭroj kaj grava agnosko al EEU, kies projekto estis elektita por financado inter nur 5% de sukcesaj projektoj. La projekton konceptis kaj ellaboris Zlatko kaj Maja Tišljär. Por la alia projekto ellaborita por la sama projektalvoko bedaurinde mankis nur 1,75 el 100 poentoj por ankaŭ esti financata. Unu el la ĉefaj mankoj estis partopreno de nesufiĉaj landoj, bedaŭrinda konsekvenco de la malakcepto partopreni en la projekto fare de pluraj landaj asocio. La ideo de la projekto estis instigi pliaĝulojn eltrovi kaj redakti vivpriskribojn de malpli konataj personoj kiuj havis transnaciajn ideojn kaj tiel malrekte kontribuis al la ideoj de komuneco en EU. Tamen EEU sukcesis per ambaŭ petoj esti inter 6% de plej bonaj projektoj en 2011 kadre de unu el la plej ŝatataj programoj de EU kun plej malaltaj sukcesŝancoj.

Interesa estis aktivado je la kampo de diskonigado de la teksto de eŭropa himno en Esperanto en diversaj lokoj de EU. Kadre de la festo de la Tago de Eŭropo en Nowy Sacz (Pollando) Halina Komar aranĝis ke du urbaj korusoj kantis la tekston de la himno en Esperanto kaj en la pola traduko dum centra urba manifestacio kaj Zlatko Tišljär faris alparolon tiusence al la ĉeestanta neesperantista publiko kaj membroj de la Pola E-kongreso. Flory Witdoeckt kantis plurfoje la esperantan tekston en diversaj neesperantistaj aranĝoj en Belgio kun grava sukceso distribuante ankaŭ la tekston al la publiko kiu kunkantis. Ŝi sukcesis konvinki la organizantojn de „Festivalo de Korusoj en Belgio“ 2012 enprogramigi la eŭropan himnon por komuna kantado de ĉiuj partoprenantoj korusoj. Johano Derks donis bonan sugeston distribui la notojn kaj la tekston al laŭeble multaj eŭropaj korusoj. Tiu propono iom post iom realiĝas. Oni finpreparis la proponotan materialon kaj serĉas adresojn de korusoj.

La estraro aktive preparis la realigon de la propono al Eŭropa Komisiono startigi eŭropan popoliniciaton proponante enkonduki la tekston de Eŭropa himno kaj prezentante ĝin tuj post kiam la leĝo pri tio ekvalidos (en aprilo 2012). Tiusence EEU organizis vastan diskuton pri la formulado de la propono en la reto kaj dum la UK en Kopenhago.

Maja kaj Zlatko Tišljär ellaboris aron da pliaj projektoj por la eŭropa financado. Por la aktiva civitaneco du projektojn kaj peton por ĝenerala financado de la laboro de EEU kaj du projektojn por Grundvig-partnereco. Unu sukcesis, du malsukcesis kaj du estas ankoraŭ atendantaj la decidon de EU.

La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj assembleaj membroj partoprenis en aro da neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj aranĝoj diverstipaj. Inter alie elstaras kvalita aktiva partopreno en la Ekonomia Forumo en pola Krynica en kiu refoje estis organizita tre videbla stando de EEU, apud kiu pasadis dum la 4 tagoj pli ol 2600 partoprenintaj forumanoj inter kiuj ŝtatestroj, gravaj politikistoj, ekonomikistoj, bankistoj kaj pli ol 500 ĵurnalistoj. Petro Baláž kaj Jozef Reinart prelegis kaj diskutis kadre de du podiaj

diskutoj. Kune kun polaj esperantistoj gvidataj de Halina Komar ili partoprenis ankaŭ en aranĝo de pliaĝuloj.

Gravan eŭropan agadon realigis hungaroj. Sinjoro Gadoš aperigadis elektrtronikan informilon dum la unua duono de la jaro kiam Hungario prezidis Eŭropan Union en kiu li regule informadis pri la agado de EU (www.vilagnyelv.tripod.com) „Aktualaĵoj en Eŭropa Unio”. En la posta jaruono komencis en Hungario aperadi informilo en Esperanto sub la nomo Eŭropa civitano (www.europacivitano.wordpress.com) kiu regule kaj aktuale informas pri gravaj novaĵoj rilataj al EU-organoj kaj pri gravaj okazaĵoj. En la dua jaruono transprenis la EU-prezidadon Pollando. Ankaŭ tie esperantistoj sukcesis pri alia grava atingo. Kadre de la oficiala informilo de EU-prezidado aperis en pluraj lingvoj artikolo pri Esperanto kaj Zamenhof en decembro 2011.

Politika aktivado ĉiam pli rilatas al Esperanto. Italaj esperantistoj estis tre aktivaj. ERA (Espetrantista Radikala Asocio) kunpartoprenis en grava demonstrado politika organizita de Radikala Partio kaj en la kongreso de Radikala Partio kiu akceptis escepte pozitivan rezolucion dum sia kongreso notante ke estas homa rajto povi elekti Esperanton en internacia komunikado. Italaj esperantistoj ankaŭ aktive partoprenis en Pacmanifestaĵo kaj dum la papa sinturno al kredantoj okaze de Pasko kaj Kristnasko.

Polaj esperantistoj aranĝis solenaĵon okaze de la transdono de meritmedalo al Etsuo Miyoshi, kiun decidis doni al li la pola ŝtatprezidanto. Pola EDE ricevis diversformajn subtenojn de pluraj polaj parlamentanoj. Germana Pirata Partio aperigis sian politikan programon ankaŭ en Esperanto kion faris ankaŭ Junulara Sekcio de Eŭropaj Verduloj. Gravuloj kiuj iel rilatis al Esperanto estis la papo Benedikto la XVI kiu kaj dum Pasko kaj dum Kristnasko salutis la kredantojn ankaŭ en Esperanto, itala ŝtatprezidanto Giorgio Napolitano, kiu okaze de vizito al Rumanio, menciis E-on kaj la pola ĉefministro Tusk, kiu dum la parolo kun Halina Komar en Krynica diris ke li informiĝis kaj iom okupiĝis pri Esperanto dum sia juneco. Slovena politikistino kaj antaŭa membrino de Eŭropa Parlamento, esperantistino, Ljudmila Novak fariĝis ministrino en la slovena registaro.

Dum la Itala E-kongreso okazis aparta prieŭropa seminario kiel projekto financata de EU kaj en scienca simpozio ĉe Lago di Garda en Italio „Lingvo, povo kaj kono” prelegis kelkaj sciencistoj esperantistoj (R. Corsetti, D. Astori, Wim Jansen).

Grava ekstera atingo en la jaro 2011, kvankam sen rilato kun EEU, estis la eblo uzi Facebook en Esperanto.



9-a Eŭropa Esperanto-Kongreso de EEU, Irlando, 16-20-a de julio 2012

En 2009 la asembleo decidis ke la sekva EEU kongreso okazos en Gaillimh/Galway (Galivo), dulingva urbo de 70.000 loĝantoj ĉe la okcidenta marbordo de Irlando, de la 16-a ĝis la 20-a de julio 2012. La temo estos **Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli**, kaj ni celas altiri atenton al la uzo de Esperanto por plibonigi lingvolernadon. En 2011 la estraro kunlaboris kun la starigita Loka Kongresa Komitato en tiu urbo, kaj organizis informadon. Pri la konkretaj agadoj zorgis Maja Tišljar, kiu preparis ĉiujn informilojn kaj ellaboris apartan kongresan paĝaron (www.eeu-kongreso.webnode.com) kun ĉiuj necesaj informoj kaj la eblo rete aliĝi. Ŝi vizitis Galivon, havis interparolojn kun

LKK kaj rezervis necesajn hotelojn. Ni ankaŭ intense informadis pri la kongreso per la paĝaro, afiŝoj kaj faldfolioj dum la UK, Kataluna Kongreso, tra la reto. Seán prelegis pri la Galiva kongreso dum la skota-brita kaj german-dana-pola kongresoj. Pri la ekskursoj zorgas la neesperantista LKK en Galivo.

Enmovada Agado



Ni organizis la kunsidon de la asembleo de EEU dum la Universala Kongreso en Kopenhago la 26-an de julio, kiu okupiĝis pri la administraj tagordaj punktoj. Dum tiu kunveno estis oficiale akceptita Rumana E-Asocio kiel membro kaj la asembleo decidis proklami la jaron 2012 LA JARO DE TIBOR SEKELJ kaj inviti landajn asociojn kontribui al la prifesto de la jaro per manifestadoj dediĉitaj al tiu grava esperantisto kaj verkisto.

Malferma kunsido de la asembleo por ĉiuj interesitoj en kiu partoprenis centoj da eŭropanoj okazinta la 28-an de julio traktis la raporton pri la laboro de EEU kaj la temon por la popolinicato en EU kiun proponos EEU al Europa Komisiono en 2012. Ambaŭ kunvenoj estis tre sukcesaj. En la unua partoprenis trideko da asembleanoj kiuj akceptis necesajn decidojn kaj en la alia okazis utilaj diskutoj kaj proponoj. La 27-an de julio okazis dua kunsido de la estraro (plivastigita per Josef Reinvart kaj Maja Tišljár) en Kopenhagaj ejoj de la ambasadejo de Slovakio kiu akceptis decidojn pri estonta agperiodo en 2011. La unuan fojon en 2011 la estraro kunsidis en marto en Bruselo.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11 fojojn (julia-aŭgusta numero estis komuna) ĉiu je 12-16 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu kaj en www.gazetejo.org kie oni povas konsulti ĉiujn numerojn. Redaktis ĝin la sekretario kaj teknike aranĝis Raymond Gerard kaj Maja Tišljár.

La kunlaboro kun UEA estis bona kiel kutime: Niaj reprezentantoj ĉeestis en kelkaj aranĝoj de UEA (malfermaj tagoj de UEA, en la komitatokunsidoj kaj komisionoj de UK en Kopenhago) kaj kunorganizis kun UEA (kiu helpis finance) la partoprenon en Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando). Ĉi-lastan kunfinancis ankaŭ la fondaĵo ESF. La **landa agado** estis kontentiga, kvankam ni ankoraŭ ne sukcesis kunlaborigi plurajn landajn asociojn. Ni plu korespondis kun la prezidanto de Bulgara E-Asocio Božidar Leonov kun la celo ke BEA aliĝu, kio efektive okazis fine de la jaro. Ni ankaŭ pri tio korespondis kun la nura aktiva esperantisto en Kipro stimulante lin fondi E-societon. Kadre de la Eŭropa Bulteno regule aperis la rubriko pri landaj asocioj kaj en 2011 aperis artikoloj pri la E-movadoj en Germanio, Kroatio, Malto, Belgio, Britio, Aŭstrio, Pollando, Rumanio kaj Latvio.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras minimuman salajron de nia projektdirektorino Maja Tišljár. Pli ol intensa estis kunlaboro kun Pola E-asocio kaj

kun Kataluna E-asocio en kies kongresoj partoprenis Zlatko Tišljar kaj Seán Ó Riain partoprenis kaj prelegis dum la skota-brita kaj german-dana-pola kongresoj.



Ankaŭ bone ni kunlaboris rilate novajn eŭropajn projektojn kun slovakoj, hungaroj, danoj, poloj, slovenoj, germanoj kaj kroatoj. Kelkaj estraranoj partoprenis en kelkaj landaj kongresoj: Seán Ó Riain en la franca kongreso, Flory Witdoeck en la belga, Zlatko Tišljar en la pola (Nojĝ Sacz), kroata (Bjelovar) kaj kataluna (Barcelona), Petro Balaž en la ĉeĥa kaj en kelkaj aliaj gravaj aranĝoj kiel KAEST kaj SES. Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por

2011 kio inkluzivas:

Prizorgado de la retpaĝaro pri kio zorgis Maja Tišljar kiu ankaŭ kreis novan paĝaron pri la Galiva kongreso. Ŝi kaj la sekretario organizis preparlaborojn por la Triesta konferenco (okazis preparakunsido de la partneroj en Triesto en septembro, invitoj al la prelegantoj, invitoj al kunlaboro al pluraj ĵurnalismaj fakultatoj, kunlaboro kun LKK (gvidata de Edvige Ackerman) kun kiu okazis plia kunsido en Zagrebo decembre. Triestanoj organizis tre bonajn kunvenojn kun la lokaj politikaj kaj instruaj instancoj kaj kun la kroata kaj slovena konsulejo. Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj) estis plene plenumita.

Kiel kutime, la estraranoj (ĉefe Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvar) ĉeestis en pluraj aranĝoj neesperantistaj en Bruselo en kiuj oni traktis la lingvan temaron. Maja Tišljar partoprenis kiel ekstera fakulo kaj reprezentanto de EEU en 3 kunvenoj de grupo por aktiva eŭropa civitaneco, kadre de stukturigita dialogo kun Eŭropa Komisiono rilate financadon de neregistaraj organizoj.



Okaze de eŭropa lingva tago la 21-an de septembro la estraro invitis landajn asociojn festi ĝin per prelegoj kaj publikaj aranĝoj. Tiusence plej elstaris la agado de Edukado.net, de la franca kaj brita E-asocioj. Multaj informoj pri E-agado aperis en neesperantistaj informrimedoj kaj ni ne kolektis precizajn indikojn sed sendube la plej elstaran laboron tiusence havis la brita E-movado kaj la hispana. Maja Tišljar partoprenis kadre de la stando de E@I en Expolingua en Berlino, la plej granda eŭropa lingvofoiro.

Financoj

La kotizpagado en 2011 ne okazis pli bone ol antaŭe. Pagis la kotizojn 13 LAoj (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Danlando, Finnlando, Germanio, Irlando, Luksemburgio, Malto, Rumanio, Slovakio, Slovenio kaj Svedio) kaj du observantoj (Svislando kaj Kroatio). Ne pagis la jenaj LAoj: Grandbritio, Francio, Hispanio, Italio, Bulgario, Estonio, Litovio, Latvio, Nederlando, Pollando kaj Portugalio. (en 2010 pagis 15 LA-oj kaj unu observanto). Okazas traktado pri re-aligo de Grekio, kiu dum multaj jaroj ne kunlaboris.

La jaro finance estis esence pli bona ol la antaŭa, ĉar ni ricevis unuan parton de la nove aprobita projekto (Triesta konferenco) kaj komencis pagoj por la EEU-kongreso en Galivo. Kiel jam dirite, estis ellaboritaj 4 grandaj monpetoj por projektoj kaj unu por regula financado de la asocio el kiuj unu estis aprobita, du malaprobitaj kaj du ankoraŭ atendas la decidojn. Flory Witdoeckt ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2010 kaj por la asembleo en Kopenhago. La raporton kontrolis reviziistino Helene Fantom. La raporto estis pozitive taksita.

Ni sukcesis reteni en tre minimuma formo la profesion laboron de Maja Tišljar (kiu daŭre pretis fari sian laboron kontraŭ minimume permesitaj pagoj per kiuj eblas formale esti registrita kiel salajrata persono en Germanio kaj kroma pago por projektlaboro). Tio gravis, ĉar la kondiĉo por eventuale ricevi konstantan financadon estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas, speciale kiam necesas administri kaj organizi kaj la aprobitan projekton kaj la 9-an Eŭropan Esperanto-Kongreson de EEU en Galivo.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU
Februaro 2012.

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 4-an de marto 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Edvige Ackerman, Đorđe Dragojlović, László Gados, Javier Guerrero, Bengt Nordlöf, Seán Ó Riain, Maja Tišljar, Zlatko Tišljar, Fritz Wollenbe.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpago: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

